

HISPANA ESPERANTO

Ilustrita ĉiumonata gazeto, por la propagando de Esperanto kaj diskonigo de la Historio, Arto, Literaturo, folkloro kaj naturaj belaĵoj, de nia lando.—Redakcio: Glorietta de Bilbao, 5.

Julio Mangada Rosenörn.—MADRID

II ^a JARO	NUM. VII kaj VIII—JULIO-AŬGUSTO 1929	II ^a JARO
-------------------------	--------------------------------------	-------------------------

PROVIZORA PROGRAMO POR LA VIII^a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO EN OVIEDO.

14^a-18^a DE SEPTEMBRO PROKSIMA (1929)

La 14^{an} je la 11^a kaj duono, malfermo kun ĉeesto de aŭtoritatuloj kaj dume la muzikistaro de la infanteria Regimento «Princo» ludos el sia repertuaro sed ĉefe la Asturan Esperantan Himnon kaj «La Espero'n». Sekve inaŭguro de la Internacia Ekspozicio por Lernejoj Laboritaĵoj kun Esperanta Fako.

Posttagmeze: De la 4^a ĝis la 7^a, oni vizitos la urbon kaj ĝiajn monumentojn.

Je la 7^a 1/2, unua laborkunsido en la ĉefa salono de la Popola Ateneo de Oviedo.

Rimarkoj: Por la Internacia Ekspozicio, la Organizanta Komitato jam havas tre interesan materialon senditan de Geinstruistoj el la jenaj landoj: Germanujo, Svedujo, Norvegujo, Danujo, Nederlando, Estonio, Italujo, Japanujo, Polujo, k. c. Ankaŭ estas rimarkinda materialo el naciaj lernejoj. Por la Ekspozicio, la Ministro de Publika Instruado donacis altvalorajn librojn celante premii per ili la plej bonajn materialkolektojn kiujn ankaŭ premias la Komitato mone.

La Kongresanoj admiras la Sanktan ĈambRon de la Katedralo kun ĝia altvalora artplena juvelaro aŭ trezoro, el ĝi oni admiras la faman Krucon de l' Anĝeloj, kiu estas simbolo de la urbo, kaj la Krucon de la Venko, kiu estas ĉefa parto de la provinca blazono.

Inter la monumentoj vizitotaj estas la preĝejoj San Julián de los Prados ĉe la urbo mem, Santa María de Naranco kaj San Miguel de Lillo apud la urbo, ĉe la pitoreska monto Naranco. Ĉi tiuj tri preĝejoj estas rimarkindaj specimenoj el la hispana arta trezoro, bizantinistilaj de la IX^a al la X^a jarcento.

La 15^{an}, je la 9^a matene, solena meso kun kapelorkestro kaj ĥoroj, kaj elokventa esperanta prediko de pastro Cristobal Fournier. Ĉiuj pastroj partoprenontaj la meson estas esperantistoj.

Je la 11^a la Urbestraro akceptos oficiale la Kongresanaron. Je la 4^a *posttagmeze*, la tuta Kongresanaro ekskursos, *tute senpage per bonegaj aŭtobusoj*, al Noreña. Ĉi tie la lokaj aŭtoritatuloj, muzikistaroj kaj multenombraj belaj fraŭlinoj esperantistaj tipe vestitaj laŭ kutimo de la regiono, akceptos la Kongresanaron, kiu ĝuos unu el plej tipaj kaj famaj kampofestoj de Asturias kun regionaj kantoj kaj dancoj. Je la 9^a, reveno al Oviedo; kaj je la 11^a vespere, dua laborkunsido.

La 16^{an}, je la 11^a matene, tria laborkunsido. Je la 1^a *posttagmeze*, la Provinca Deputataro Oficiale akceptos la Kongresanaron. Je la 4^a (*posttagmeze*) solenege grandioza muzikfesto organizota de l' Orfeon Ovetense je la honoro de la Kongresanoj. Ĥoro el cent voĉoj (viroj kaj virinoj) kantas la plej belajn kantojn de Asturias, la Himnon de la Asturaj Esperantistoj kaj «La Espero», kaj ĉi tiujn himnojn akompanos la meritplena jam aludita muzikistaro de la Regimento «Princo». Dum halto aŭ kantintertempo, la asturaj samideanoj honoros la ĉeestantajn flagojn per esperantaj altvaloraj laĉoj memorigantaj a Kongreson, kaj oni disdonos la premiojn al sendintoj la plej bonajn parojn el pupoj laŭ la kondiĉoj de la konkurso, por kiu naciaj kaj fremdaj Grupoj promesis parojn, kaj, post la premiado, la pupoj estos transdonotaj al Tombolo por Geinfanoj funkcia en Oviedo dum Septembro, ankaŭ oni disdonos la premiojn al la lernejoj pro la Internacia Ekspozicio.

La 17^{an}, je la mateno, ekskurso de la Kongresanaro por viziti la plej admirindajn pejzaĝojn de Asturias (Villaviciosa, Mi-

PAROLOJ DE H. G. WELLS

Ankoraŭ mi estas nun pli, ol antaŭe, kontraŭnaciema. Mi opinias, ke la grupiĝo el gentoj por trograndigi kaj plialtigi proprajn karakterizojn, kaj por malestimi, forigi aŭ ofendi, ceteron el la Homaro, liveras nenian bonon. Per mi ne havas allogon la laŭdataj naciaj kostumoj, ĉiuj tre similaj ĉe Eŭropo-virinoj kun kofoj el muslino ornamataj de nigraj kaj ruĝaj ŝtofoj, kaj viroj luksmontrantaj butonarojn el perloj (montritaĵoj de la nacia industrio) same, kiel estas similaj kastanjetoj, ceramikaĵoj kaj punktoj, de ĉiuj landoj. Nek okazigas profiton la naciaj dialektoj, la naciaj literaturoj, la naciaj simboloj, kiuj pretendas enteni logikan bazon, sed kiuj reale celas konservadi danĝeran unuecon pri mizera lokalizo, kaj kiuj enhavas preferegon pri propra amo inspirita de mallarĝa kriterio kaŭze de longedaŭre kutima tiraneco, kiun oni volas subtenadi ĉe la tuta kontinento. Mi estas konvikata partiano de Kosmopolis' kaj de la reala vojo al ĝi kaj kiam mi rimarkas, ke naciismo starigas por krei komercajn kaj monajn konfliktojn, por malfaciligi liberajn movojn de homoj kaj komercaĵoj ĉe ĉi tiu ne vasta planedo, por okazigi fanfaronadojn, naski kontraŭstarojn, movilizi militistarojn kaj sufoki la ĝeneralan bonon por la negoco de la bandoj ekspluatantaj la patriotajn instinktojn, mia manko de entuziasmo fariĝas antipatio.

Verŝajne por mi, mi naskiĝis kosmopolita. Neniam mi sentis tutplene simpatian al la prefero de la sudaj irlandanoj por mastrumi iliajn lokaĵojn, kvankam mi povis konstati ofendojn al ili realaj, veraj; al la nekonsento de la sudirlandanoj kunlaboradi kun loĝantoj de l' *Ulster*, kun Angloj, kun Skotoj kaj loĝantoj de la Lando de Gales, por la aventuroj, kiujn, tra la mondo, entreprenus la Imperio; kaj mi ne sentis tiun simpatian, mi rediras, kvankam naŭzigis min la intencoj kaj metodoj de Cecil Rhodes kaj doktoro Jameson. Laŭ mia opinio, estis pli konvene subteni la unuiĝon de l' Suda Afriko kiel parton de granda tutmonda sistemo, ol permesi la apartan memstarigon de du liberalajn Respublikoj monopoligantaj la vivforton de *Kaffir* kaj la mineralan riĉaĵon de vasta terpeco, kies ekspluatado povis liveri profiton al la tuta Homaro.

Por mi naciismo eĉ neniam estis laŭdinda senkulpigo por la

steriligo de iu vasta areo kun potenca riĉeco tial ke ne tute civilizata popolo ĝin mastrumu kaj loĝu en ĝi: *la tuta tero estas por la tuta Homaro!*

El artikolo «Kiel marŝas la Mondo» aperinta sur la Madrida ĵurnalo *El Sol* de la 18^a de septembro de 1928.

Wells interesiĝas pri la bono al la Homaro, por tiu bono nepre necesa estas Esperanto; ĉu li interesiĝis jam pri Esperanto? Se ne, la anglaj samideanoj devas konigi al li la efikon de Esperanto por tutmonda frateco kaj varbi lin al nia lingvo.



SOCIEDAD ESPAÑOLA ESPERANTISTA

El Comité Central de Hispana Esperanto Asocio ha convenido, entre otros asuntos, en sus reuniones ordinarias: Aprobar las Actas del Congreso de Sevilla; que las Actas de los Congresos celebrados bajo los auspicios de H. E. A. lleven el visto bueno del Presidente, cuando éste no sea el Presidente efectivo del Congreso; que D. Antonio Jiménez Mora sea el promotor y organizador del VIII Congreso Español de Esperanto en Oviedo; aceptar a D. Salvador Oliván como Vocal representante de los samideanos de Galicia; nombrar la Comisión para estudiar las proposiciones presentadas ante el Congreso de Sevilla; invitar a los samideanos para que confirmen sus Vocales, o los elijan donde no los haya; rebajar a CIEN pesetas la cuota para tener voz y voto en la Representación Internacional Esperantista, y que éstos y los siguientes acuerdos sean publicados en HISPANA ESPERANTO, para que, por su mediación, lleguen a conocimiento de todos los consocios de H. E. A.

ENLANDA KRONIKO

Almansa (Albacete).—Eksterordinare Esperanto fruktiĝas ĉi tie; kurso disvolviĝodas kun pli ol kvardek lernantoj.

El Ferrol.—Pli kaj pli sukcesas ĉi tie ankaŭ nia afero, ĉiutage sin deklaras novaj adeptoj.

Cheste (Valencia).—Rimarkinda estis la akcepto, kiun faris al S-ro Adalberto Smit, de la Hago, la tuta urbo; neniam, nenie, nia Holanda samideano spertis saman okazintaĵon, kaj certe li ĉie esprimos siajn fortajn impresojn pro la okazintaĵo, ĉar li ankaŭ havis la ĝojon sin turni al tuta loĝantaro favora al Esperanto.

Cordoba.—Ĉi tie la movado iras antaŭen, kaj ĵus S-ro Adalberto Smit, ĉe la ejo de Gasistoj kaj Elektrikistoj, faris paroladon pri Holandujo kaj ĝiaj kolonioj kun lumbidoj. Profitdona estis la okazintaĵo, ĉar mirinde ĝuste nia kompetenta samideano S-ro Azorin tradukis la paroladon de la Holandano por la neesperantista publiko spertanta pri utileco de nia helpa lingvo internacia.

Caceres.—«El Nuevo Dia» regule aperigas serion el tre gravaj artikoloj pri Esperanto, per kiu nia sperta samideano S-ro Soler influas serioze la legantojn al intereso por la lingvo. Ĉi tiu laboro estas promesanta abundan rikolton ĉe loko, kie neniam Esperanto burĝonis antaŭe.

Madrid.—Dimanĉon, 16^{an} de junio, ĉe la Sporta Societo de l' Gaso, S-ro Salvador Pérez faris interesan paroladon pri Esperanto en la socia movado kaj fine la ĥoreto de la Grupo «Antaŭen» kantis iujn popolkantojn. Ĉi tiu okazintaĵo estis daŭrigo de la propaganda laboro entreprenita de la dirita Grupo, kiu rimarkinde progresas dank' al tia laboro.

Dimanĉon 23^{an} de la sama monato, ankaŭ S-ro Adalberto Smit paroladis ĉe la ĉefa salono de la Ateneo pri la temo «Penado al Tutmonda Unuiĝo» kaj elokvente, imprese, li disvolvis la temon; sekve nia tre sperta samideano, esperanto-akademiano, membro de la Reĝa Hispana Akademio por Sciencoj kaj tutmond fama sismologo, S-ro Vicente Inglada Ors, majstre, elokventege, fidelege, tradukis hispanen la paroladon de S-ro Smit por la multenombraj neesperantistoj ĉeestantaj. Sekve estis popolkantoj, el ili la emociiga rusa popolkanto «La barko-



Tre malnova romana ponto ĉe vilaĝo de Asturias,

trenistoj de l' Volga», kiun la ĥoreto de la Grupo «Antaŭen» estis devigata rekanti. Fine ree S-ro Smit parolis por klarigi lumbildojn pri Holandujo, kaj oni tradukis la klarigojn al hispana lingvo.

Ĉi tiun okazintaĵon organizis la madridaj samideanoj sub la gvidado de H. E. A., pro kio ĝin prezidis la Prezidanto de H. E. A. kun la Prezidantino de la Centra Madrida Grupo kaj Prezidantoj de la Hispana Ligo de Esperantistaj Fervojistoj kaj de la Grupo «Antaŭen». En la podio ankaŭ sidis la Sekretario de H. E. A. kaj S-roj Inglada kaj Smit.

Vigle funkcias speciala Komitato por trafi esperantistan hejmon. La afero bone iras antaŭen, kaj same okazas pri la sukcesanta progreso de la antaŭe aludita Ligo.

Gijon.—Lernantoj de la Komerca Lernejo Jovellanos de ĉi tiu urbo ĵus fondis Esperantistan Grupon, kiun ili titolis «Ĥihona Espero». Tute leĝe kun plena entuziasmo la Grupo jam funkciadas, kaj ĝin fondis pastro Cristobal Fournier kaj liaj disĉiploj. Honora Prezidanto estas S-ro Emilio Alemany, direktoro de la Lernejo; S-ro Fournier, de la Hispana Esperanto-Instituto, Prez.; S-ro Francisco Fernandez, Vicpr.; S-ro Alfonso S. Margüenda, Sekr.; S-ro Pedro Sierra Muñiz, Vicsekr.; F-ino Encarnacion Junquera, Kas.; F-ino Luz Piñera, Vickas.; F-ino Elisa Fernandez kaj S-ro Jose Menendez, Voĉdon.

Barcelona.—Okaze de la Barcelona Internacia Ekspozicio estas starigita en Barcelono, en la strato Duran y Bas, 8, pral., Esperantista Renkontejo, funkcianta ĉiujn labortagojn de la 6^a ĝis la 8^a vespere, kun la celo akcepti kaj informi la esperantistojn, kiuj vizitas la urbon. Tiu institucio invitas ankaŭ la enurbajn geesperantistojn kaj simpatiantojn, ĉar por vigligi la entuziasmon ĝi celas krei centrurban ĉiutagan rondon da samideanoj, prezentante al ili la okazon praktiki la lingvon, legi esperantajn gazetojn, konsulti jarlibrojn kaj informiĝi pri la ĉie kreskanta esperantista movado. Ĉiuj gesamideanoj estas insiste petataj kunhelpi, ĉu per sia ĉeesto, ĉu per pago de laŭvola kotizo, ĉu per alsendo de presaĵoj kaj propagandiloj, al la plej bona sukceso de tiu ĉi arango.

Bonege, sukcesplene, funkciadas jam la Esperantista Renkontejo (Duran y Bas, 8, pral.), ĉiutage de la 6^a ĝis la 8^a vespere, kaj ĝia ekfunkciado klare antaŭvidigas gravan efikon en la Bar-

celonan Esperanto-Movadon, ĉar certe ne mankos al ĝi apogon ĉies, kaj jam estas bona garantio por ke la de ĉiuj vidpunktoj gravega institucio ne mortu la entuziasmo de la tre spertaj kaj fervoraj komitatanoj, S-roj Jozefo Alberich, Vicente Andres, Jozefo Anglada kaj Ferdinando Montserrat, kiujn apogas varme multaj tiel entuziasmaj kompetentaj samideanoj, S-roj Fusté, Escarre, Serrat, Campdelacreu, Dalmau, Orriols, Bartomeu, Domenech, Capdevila, kaj aliaj. Pri la graveco kaj seriozeco de la entrepreno parolas sufiĉe klare la jeno: la institucio dungis deĵoranto-oficiston, kies profesio estas labori por esperanto dum la difinitaj horoj, sub gvidado de la Komitato, samideanon Rosendo Bonas.

Helpu la institucion per memvola malalta monata mondon, per libroj, ĵurnaloj, gazetoj ĉiel, laŭ eblo ĉies, ĉar ĉion la Komitato dankegas.

Enspezanto faciligas kolektadon de kotizoj sen ĝeno por la helpantoj, kvankam kvitancoj oni povos pagi ĉe la Renkontejo mem.

Ĵurnalnotoj, raportoj pri Esp. kaj pri parolado de S-ro Smit, al ĵurnaloj kaj gazetoj de Barcelona, Caceres k. t. p. kaj al la grava gazeto «España y America»; akcepto al iuj fremduloj kaj samnacionoj, informoj al petantoj, estis la junia eklaboro de la Renkontejo, kiu ricevis multenombrajn gazetojn kaj aliajn presaĵojn.

Ĉiutage aliĝas samideanoj eĉ komercistoj kaj profesiistoj.


Dum junio la enspezojn atingis 77,95 ptojn; la elspezon 73,90; restas en la kaso 4,05 petoj. La kaslibro estas je la dispono de la protektantoj.

Rimarko de la R.—«Hispana Esperanto», kiu havas amikojn en tiu imitinda, laŭdinda rondo, korege sincere gratulas la samideanojn de Barcelono, ĉar tiu estas la vera vojo al triumfo de nia celo.

Ceuta.—Ĉi tie forte naskiĝas esperanto-movado dank' al S-roj Pedro Garcia, Delegito de U. E. A., Gomez Pola, Kuracisto, kiu faras grandan propagandon, kaj Jose Lopez Vargas, kiu lernis la lingvon en Oviedo kaj fariĝis indega disĉiplo de la astura pioniro S-ro Jimenez Mora.

La 30^{an} de la ĵus pasinta majo ankriĝis germana turistŝipo kaj elsiپیĝis la Delegito de U. E. A. en Lengenfeld (Germanujo-

Rejnlando), ĉi tiun akceptis S-roj Garcia kaj Lopez kun nova lernanto, kaj samideane dum horo kaj duono la interparolado de la germano kun niaj samideanoj eĉ kun la lernanto forte impresis la publikon, kiu spertis tiel pri utileco de Esperanto; tial S-ro Garcia vendis kelkajn lernolibrojn kaj malfermiĝis kurso. Certe baldaŭ, plenumante la decidon de Sevilla, oni fondos Grupon en Ceuta.



PLEJ SUPERA VIRTO

La bonon fari per sindona mano
nur pro la bono mem, ne pro afero,
ja estas bela ag', kiun de l' tero
al Di' oferas kore la kristano.


Bonfari nedankeman malamikon,
kiu juĝos vian virton malkuraĝe,
estas pli laŭda ag' kavanĉam, domage!,
estas semi sur rok' bonan tritikon.

Disdoni la nutraĵon kaj la veston,
kiuj mankas al ĉia mizerulo
estas ago pli nobla kaj laŭdinda.

Sed estas aĵ' plej granda: ĉe l' forgeso
forlasi kun la bon' al malriĉulo
la malbonon maljuste ricevinta.

El hispana lingvo tradukis

Fernando Redondo



Gijón (Asturias).—Marbordo de San Lorenzo, Banejo.

KANTO DE MURCIA

Ĉar mi prenis oranĝojn
el la ĝardeno
de belega virino;
jen, do, mortpeno...
Kiel sukero,
dolĉaj estis oranĝoj.
rondaj, laŭ sfero.

* * *

Amo ŝia bedaŭre
estas, laŭ diro,
oranĝflor' fruelekanta,
infandeziro:
forta ekamo
pro sopiro, kaj tuje
ekso pro l' samo.

* * *

Ĉar oranĝon mi tranĉis,
mia jen ravo;
ĉar stelbildo ja estis
oranĝenhavo!
Vere la stelo
estal bildo de ŝia
rava la belo.

Tradukis J. M. R.

CANTO DE MURCIA

Una totanérica
me lleva muerto
por coger las naranjas
que hay en su huerto.
Naranjas ricas,
dulces como el azúcar,
y redondicas.

* * *

Me dice quien lo sabe,
que es tu cariño
azahar que no cuaja,
pasión de niño;
lumbre tan vaga,
que un suspiro la enciende
y otro la apaga.

* * *

Partí una mandarina
y encontré dentro
la imagen de una estrella
¡Vaya un encuentro!
Se me figura
que la estrella es la imagen
de tu hermosura.

PENSARO

(*Daŭrigo*)

DE SALOMONO:

- 19.—Pli valoras vundoj faritaj de amanto, ol kisoj de malamanto.
- 20.—Ne enamikiĝu kun homo kolerema, ne kuniĝu iam kun malvirtuloj.
- 21.—La ĝojo ĉe l'koro konservas la junecon; la malĝojo sekigas la ostojn.
- 22.—Tiu, kiu juna eniras bonan vojon, ĉiam ĝin surpaŝos eĉ dum la maljuneco.
- 23.—Pli valoras peco da pano kun ĝojo, ol hejmo plena da regalontaĵoj se ĉe ĝi ne estas paco.
- 24.—Bona kredito estas pli preferinda, ol abundaj riĉaĵoj.
- 25.—Celu trakti viajn aferojn kun amiko, kaj neniam konfidu viajn sekretojn al iu ajn.
- 26.—Tiu, kiu interrilatiĝadas kun sciuloj, sciulo estos; amiko de ignoruloj estos tia, kiaj estas ili.
- 27.—En la peko mem, jen la puno.
- 28.—La malbono persekutas tiun, kiu ĝin faras.
- 29.—Vin laŭdu fremdulo kaj ne vi mem, la fremdulo kaj ne viaj lipoj.
- 30.—La mallaboremulo estas frato de la almozpetanto, kaj tiu, kiu maltatenteme zorgas siajn propraĵojn estas frato de tiu, kiu malŝparas ilin.
- 31.—Kiam amiko petu je vi favoron kaj vi ĝin povu fari, ne diru «revenu al mi morgaŭ»; male, komplezu lin tuj.
- 32.—Milda kaj humila respondo frakasas koleron; ĉi tiun naskas ofendaj paroloj.
- 33.—Tiu, kiu kulturas sian terbienon, havos abundan panon; sed tiu, kiu estas mallaborema, estos mizerulo.
- 34.—Neklerulo, se li silentus, estus konsiderata klera; ĉiuj lin juĝus tia, se liaj lipoj konstante apudestus.
- 35.—Ne preteriru la limojn fiksitajn de viaj patroj.
- 36.—Al tiu, kiu mokas la patron kaj malestimas la patrinon, la korvoj eltiru la okulojn, kaj lin manĝu aglidoj.
- 37.—Ŝtelitaĵoj aŭ malpermesataj plezuroj estas pli dolĉaj, kaj ŝtelita aŭ kaŝita pano estas pli bongusta, ol hejmaj.
- 38.—Tiuj, kiuj staras sur mensogoj, sin nutras el vento.

COLECCION DE PENSAMIENTOS

(Continuación)

DE SALOMÓN:

- 19.—Más valen las heridas causadas por el que ama que los ósculos del que aborrece.
- 20.—No trabéis amistad con el hombre iracundo, ni os asociéis jamás con viciosos.
- 21.—La alegría del corazón conserva la edad florida; la tristeza seca los huesos.
- 22.—El que entra joven en buen camino no lo dejará aunque llegue a viejo.
- 23.—Vale más un bocado de pan con alegría que la casa llena de regalos, si en ella no hay paz.
- 24.—Un buen crédito es preferible a la abundancia de riquezas.
- 25.—Procurar tratar vuestros asuntos con el amigo, y jamás fiéis vuestros secretos al extraño.
- 26.—El que anda con sabios, sabio será; el amigo de los necios, será cual ellos.
- 27.—En el pecado se lleva la penitencia.
- 28.—El mal persigue al que lo hace.
- 29.—Alábetelo ajeno y no tu boca; el extraño, y no tus labios.
- 30.—El perezoso es hermano del mendigo, y el que mira con negligencia sus intereses es hermano del que los disipa.
- 31.—Cuando un amigo os pida un favor y podáis hacerlo, no le digáis «vuelve mañana», sino complacedle enseguida.
- 32.—La respuesta suave y humilde quebranta la ira; las palabras duras excitan el furor.
- 33.—El que labra su tierra tendrá pan de sobra; pero el que ama la ociosidad estará lleno de miseria.
- 34.—El ignorante, si calla, será reputado por sabio, y pasará por entendido si no despliega sus labios.
- 35.—No traspaséis los límites fijados por vuestros padres.
- 36.—A aquel que se mofa de su padre y desprecia a su madre, cuervos le saquen los ojos y se lo coman los hijos del águila.
- 37.—Las aguas hurtadas o deleites prohibidos son más dulces, y el pan tomado o escondido es más sabroso.
- 38.—Quien se apoya en mentiras se alimenta de vientos.

- 39.—Baldaŭ forpasas la riĉaĵoj, kiujn oni akiris tre rapide; tamen, konstante kreskadas tiuj, kiuj oni akiras iom post iom per laborpenado.
- 40.—Ne fidu je heredotaĵo ĝis kiam ĝi estu ricevitaĵo.
- 41.—Tiu, kiu esperas ricevi ŝuojn de mortinto, riskas paŝi piednude.
- 42.—La beleco de fiera virino estas kvazaŭ ora ringo ĉe buŝego de porko.
- 43.—La doktrinon aŭ scion de homo oni konas per lia pacienco, kaj lia gloro estas ne atenti ofendojn.
- 44.—Feliĉa homo tiu, kiu trafis la scion kaj kiu estas riĉa je saĝeco.
- 45.—Virino laborema estas krono de la edzo; male, malvirtulino estas vermo mordetanta liajn ostojn.
- 46.—Tiu, kiu gardas sian buŝon, gardas sian animon; sed parolemulo suferos malbonaĵojn.
- 47.—Tiu, kiu ŝatas ĝentilecon, ŝatas scion; tiu, kiu malŝatas admonojn estas malsaĝa.
- 48.—Tiu, kiu pardonas malbonulojn, kaŭzas malbonon al la bonuloj.
- 49.—Tiun, kiu bone satas, eĉ mielo naŭzigas; sed al malsatulo maldolĉaĵo estas dolĉa.
- 50.—Tiu, kiu festenigadas, iam ricevos almozon.
- 51.—Espero longedaŭra suferigas.
- 52.—Post la fiero tute sekve jen la malfeliĉo.

(Daŭrigota)

Kolektis kaj tradukis J. M. R.

GRAVA PAŜO AL NIA CELO

La *Gaceta de Madrid* de la 15^a de junio lasta, n-ro 166, sur sia 1.583^a paĝo kaj centra kolono, diras:

«Pro la peticio de S-ro Julio Mangada Rosenörn, Infanteria Komandanto, loĝanto de Madrido, per kiu li diras, ke, ĉar en ĉiuj civilizitaj landoj la lernado de Esperanto disvastiĝadas pli kaj pli kaj same invadas ĉe ili la elementajn kaj superajn lernejojn, kaj ĉar estas rimarkindaj la atingitaj rezultatoj, li proponas malfermon de Esperanto-kurso por 30 Geinstruistoj el la naciaj Lernejoj de Madrido.

- 39.—Los bienes que se adquieren muy de prisa pronto se menoscaban, así como van en aumento los que se adquieren poco a poco a fuerza de trabajo.
- 40.—No debe contarse con una herencia hasta que se posee.
- 41.—El que espera los zapatos de un muerto peligra de andar descalzo.
- 42.—La belleza de una mujer fatua es como sortija de oro en el hocico de un cerdo.
- 43.—La doctrina o el saber de un hombre se conoce por la paciencia, y su gloria es no hacer caso de las injurias.
- 44.—Bienaventurado el hombre que halló la sabiduría y que es rico en prudencia.
- 45.—La mujer hacendosa es la corona del marido, así como es carcoma de sus huesos la de malas costumbres.
- 46.—Quien guarda su boca, guarda su alma; pero el hablador sentirá los perjuicios.
- 47.—El que ama la corrección ama la ciencia; el que aborrece las reprensiones es un insensato.
- 48.—El que perdona a los malos perjudica a los buenos.
- 49.—El que está bien comido aun de la miel hace ascos; pero al hambriento le parece dulce lo que es amargo.
- 50.—Quien gusta de dar banquetes parará en mendigo.
- 51.—La esperanza que se dilata aflige el ánimo.
- 52.—La desgracia sigue al orgullo.

(Continuará)

Coleccionó J. M. R.

UN GRAN PASO HACIA NUESTRO OBJETIVO

La *Gaceta de Madrid* del 15 de junio último, número 166, en su página 1.583 y columna central, dice:

«Vista la instancia de D. Julio Mangada Rosenörn, comandante de Infantería, vecino de Madrid, en la cual manifiesta que, dada la extensión que en la instrucción elemental y superior en los pueblos civilizados va tomando la enseñanza de la lengua auxiliar internacional Esperanto y los resultados de la misma, propone la apertura de un curso de Esperanto para 30 maestros y maestras de las Escuelas nacionales de Madrid.

»Li apogas sian peticion dirante, ke de tre longe li klarigadas kaj propagandas la lingvon, kaj ke li reprezentis senpage honore ĉi tiun Ministerion ĉe kelkaj Internaciaj Kongresoj de Esperanto, kaj ke li faros la kurson tute senpage.

»Ĉi tiu ĝenerala Direkcio decidis akcepti la peticion de la petinto, rajtigante lin por okazigi la kurson petitan dum unu monato, de la 20^a de la kuranta monato ĝis la 20^a de julio, ĉe la gradigita Lernejo por infanoj de la Florida, de la sesa ĝis la sepa kaj duono posttagmeze, pro kio estas malfermata la enregistra de lernantoj al la kurso ĉe la citita Lernejo por ke Instruistoj kaj Instruistinoj dezirantaj partoprenu ĝin.

»Ĉi tion mi diras al via Moŝto por via kono kaj ceteraj sekvoj. — Dio vin gardu multjare. — Madrido la 11^{an} de junio de 1929. — *Suarez Somonte*. — S-ro Inspektorestro de Unua instruado de la provinco de Madrido.»

La kurso estis malfermata kaj regule funkciadas, kaj kvankam la nombro da gekursanoj ne estas granda, tamen, la rezultato estos bonega, ĉar post kelkaj kursotagoj kaj pro la impresoj diritaj de la gekursanoj ĉe iliaj rondoj, naskiĝis opinioj favoraj al ripetado de la kurso, eĉ pli ampleksa, dum Oktobro, pli favora tempo. La impresoj de la gelernantoj pri la lingvo kaj disvolviĝo de la kurso estos la raporto adresota al la ĝenerala Direktoro de Unua Instruado, ili estas ĉiutagaj impresoj grandvaloraj, kiujn oni liveros, por ke ili kun la antaŭa decido estu bazo por malfermo de samaj kursoj en Cordoba, Sevilla, Badajoz, Barcelona, Zaragoza, Oviedo, Valencia, Orense, Pamplona, Cadiz, Bilbao, k. t. p. Prezidanto de Grupo aŭ tiu elektita por tio, aŭ la Prezidanto proponante la profesoron, procedos sin turnante al la Ministro de Publika Instruado kaj Belaj Artoj, petante rajtigon por malfermi kurson de Esperanto por Instruistoj kaj Instruistinoj de la loko same kiel oni okazigis en Madrido; sed atentu, ke la kurso devas esti super ĉio praktika, kiel oni povos konscii per la raporto, kiun oni liveros, kaj kaŭze de la malgranda tempodaŭro de la kurso.

»En apoyo de su petición hace presente que lleva muchos años dedicado a la enseñanza y propaganda de la lengua, habiendo representado gratuita y honoríficamente a este Ministerio en varios Congresos Internacionales de Esperanto, y que el curso lo daría con carácter gratuito.

»Esta Dirección general ha resuelto acceder a la petición del solicitante, autorizándole para celebrar el curso que pide durante un mes, del 20 de los corrientes al 20 de julio, celebrándose en la Escuela graduada de niños de la Florida, de seis a siete y media, y a este efecto queda abierta la matrícula de dicho curso en la citada Escuela para que los maestros y maestras que lo deseen puedan asistir al mismo.

»Lo digo a V. S. para su conocimiento y demás efectos.—Dios guarde a V. S. muchos años.—Madrid, 11 de julio de 1929.—El Director general, *Suárez Somonte*.—Señor Inspector Jefe de Primera enseñanza de la provincia de Madrid.»

El curso se abrió y funciona, y aun cuando el número de los que lo siguen es corto, sin embargo, el resultado será excelente, pues ya a los pocos días de clase, y por las manifestaciones hechas por algunos alumnos en sus medios de relación, han surgido opiniones en favor de repetir el cursillo, dándole mayor extensión en octubre, tiempo también más propicio. Las impresiones de los alumnos sobre la lengua y el desarrollo del curso constituirán la Memoria que se eleve al Director general de Primera enseñanza, impresiones diarias de un grandísimo valor, las cuales serán facilitadas para que sirvan de base, con la disposición anterior, para la apertura de cursos semejantes en Córdoba, Sevilla, Badajoz, Barcelona, Zaragoza, Oviedo, Valencia, Orense, Pamplona, Cádiz, Bilbao, etcétera.

El Presidente del Grupo, o aquel a quien se considere mejor para ello, o el citado Presidente, proponiendo el Profesor, procederá, cursando una petición al Excmo. Sr. Ministro de Instrucción pública y Bellas Artes, solicitando autorización para abrir un cursillo de Esperanto para los Maestros y Maestras de la localidad, análogamente a lo hecho en Madrid; pero tén-gase en cuenta que el cursillo debe ser eminentemente práctico, cual podrán colegir por la Memoria que se facilitará y dada la escasa duración del mismo.

ALIA SUKCESO

Jen tio, kion decidis la Ministerio por Maraj Aferoj, kaŭze de peticio de nia samideano de Gijon (Ĥiĥon) S-ro Francisco Menendez Rua, kiun prezentis kaj apogis H. E. A.:

«Estas ŝtampaĵo diranta: «Ministerio de Maraj Aferoj.=Centra Kaso por Mara Kredito.=Konstanta Komitato.=Tial ke estis prezentata al la Konstanta Komitato de ĉi tiu Kaso, dum la okazigita kunveno de la tago 14^a de ĉi tiu monato, peticio subskribita de S-ro Francisco Menendez Rua, petanta fari senpagan servon por instrui Esperanton en la Lernejo de la Mar-tera Kreditkaso de ĉi tiu loko, samtempe petanta, kompanse oni difinu al li oficialan titolon kiel Profesoro de Esperanto, oni decidis konsenti la petitaĵon, kondiĉe ke tio ne determinu ian elspezon al ĉi tiu Kaso.=Mi tion komunikas al vi por kono via, por tiu de la interesato, kaj por tiu de la Direktanta Komitato de tiu Kaso.=Dio vin gardu dum multaj jaroj.=Je la nomo de la Prezidanto. Rafael Riaño. Parafo.=Al S-ro Inspektoro de l' Martera Kreditkaso de Gijon.»

La Prezidanto kaj la Sekretario de H. E. A., pere de nia malnova samideano S-ro Alfredo Saralegui, prezentante la peticion, akompanis ĉi tiun kun nekontraŭstareblaj privileĵoj efikaj, favoraj, je la pretendo, kiujn pligravigis la nediskutebla aŭtoritateco de nia samideano Saralegui, membro de la Nacia Kunveno. Tiel, iom post iom, laŭ cirkonstancoj permesas, H.E.A. antaŭeniras en ĉiajn direktojn, konstatante sian efikon, kaj pri ĉi tio estas evidenta pruvo la ĵusa inspektovizito al nia Asocio pro Ordono de la Ĝenerala Direkcio de Dua kaj Supera Instruado de l' Ministerio de publika Instruado kaj Belaj Artoj, efektivigita de Inspektoro S-ro Manuel Chacon, kiu, mirigate de la efektivigita laboro, redaktis bonegan informon, dirante per la unuaj linioj de paraĝrafo: «Al tiuj celoj, ĉi tiu Asocio efektivigas intelligentan, konstantan kaj entuziasman laboron, kiu estas inda je ĉiaj laŭdoj...» kaj aliloke: «La Hispana Esperanto-Asocio antaŭeniras kaj progresas pli kaj pli al sia idealcelo, al oficiala enkonduko de Esperanto en Hispanujo.» Estas supozinde, ke la du ĵuse trafitaj sukcesoj ĝojigos la samideanaron, kaj ni esperas novajn triumfojn.

OTRO EXITO

Como consecuencia de petición hecha por nuestro samideano de Gijón D. Francisco Menéndez Rúa, presentada y apoyada por H. E. A., he aquí lo que el Ministerio de Marina decidió:

«Hay un membrete que dice: Ministerio de Marina.=Caja Central de Crédito Marítimo.=Comisión Permanente.=Dada cuenta a la Comisión Permanente de esta Caja, en sesión celebrada el día 14 del actual, de la instancia suscrita por D. Francisco Menéndez Rúa, solicitando prestar servicio gratuito para dar clase de Esperanto en la Escuela del Pósito Marítimoterrestre de esa localidad, pidiendo, en cambio, se le conceda el nombramiento oficial de Profesor de Esperanto, se acordó acceder a lo solicitado, siempre que ello no suponga gasto alguno para esta Caja.=Lo que comunico a usted para su conocimiento, el del interesado y Junta de gobierno de ese Pósito.=Dios guarde a usted muchos años.=Madrid, 17 de junio de 1929.=Por el Presidente, Rafael Riaño.=Sr. Inspector del Pósito Marítimo-terrestre de Gijón.»

El Presidente y el Secretario de H. E. A., por mediación de nuestro antiguo samideano D. Alfredo Saralegui, al presentar la aludida petición, acompañaron elementos de prueba eficaces en pro de la pretensión, que fueron reforzados por la autoridad indiscutible de nuestro samideano Saralegui, miembro de la Asamblea Nacional. Así, poco a poco, conforme lo permiten las circunstancias, H. E. A. va abriéndose camino en todas direcciones y probando su eficacia, siendo una demostración evidente de ello la reciente visita de inspección pasada a nuestra Sociedad de orden de la Dirección general de Enseñanza Superior y Secundaria del Ministerio de Instrucción pública y Bellas Artes por el Sr. Inspector D. Manuel Chacón, quien, admirado de la labor realizada, cursó un excelente informe diciendo en el inicio de uno de los párrafos: «Persiguiendo esos fines, viene realizando esta Sociedad una labor inteligente, perseverante y entusiasta, digna de grandes alabanzas...» y más adelante: «La Sociedad Esperantista Española lleva una marcha ascendente y progresiva en persecución de su ideal, de que se implante oficialmente el Esperanto en España.» Es de suponer que los dos recientes éxitos alcanzados causarán alegría en todos cuantos integran H. E. A., y esperamos nuevos triunfos.

PRI INTERPUNKCIO POR LA SKRIBAĴOJ

(Daŭrigo)

UZO DE LA KOMO (,)

I.—Se oni metus la propozician komplementon antaŭ tiu de ideo, ĉi tiun oni apartigus per komo: oni rekomendis lerni bone la ŝlosilon, *al la lernantoj*.

II.—Oni apartigos per komo du propoziciajn komplementojn, kiam ili ne formas serion kaj estas tute malsamaj: la profesoro donis premiojn al plej studemaj lernantoj, *por stimuli la ceterajn*.

III.—Du aŭ pliajn komplementojn de ideo, kiam ili ne formas serion, oni apartigos per komo, kiam ili povas fariĝi modifantaĵoj por la antaŭaj: *morgaŭ alvenos esperantisto de Parizo* signifas, ke la *esperantisto naskiĝis en Parizo*, ĉar *de Parizo* modifas en ci tiu kazo *esperantisto'n*; sed kiam oni volas esprimi ke la *deirloko de la esperantisto estas Parizo*, estos necese meti komon post *esperantisto*, por eviti konsideri *de Parizo* modifantaĵo.

IV.—Kiam modifantaĵoj akompanas membron, oni metos komon: je la fino, se la modifantaĵo estas determinanta kaj propozicia, por esprimi ke la sekvantaĵo estas parto de la ĉefa propozicio kaj ne de la determinanta; je la komenco kaj je la fino, tio estas, inter komoj, kiam la modifantaĵo estas propozicia kaj klariganta, pro la malproksima rilato inter la modifantaĵo kaj la vorto modifata; je la komenco kaj je la fino, inter komoj, la modifantaj vokativoj kaj anstataŭantaĵoj. Ekz.: La domo en kiu loĝis la Greko, *estas hodiaŭ muzeo de liaj pentraĵoj*; Esperanto, *potenca ilo por kunigi la homojn*, atingos triumfi; silentu, *kalamniantoj!*, ne atencu honoron de la ceteraj; Zamenhof, *la kreinto de la helpa internacia lingvo Esperanto*, estis unu el plej grandaj bonfarantoj de la homaro.

V.—Ĉiuj esprimoj konjunkciaj aŭ adverbaj, kiuj ne havas proksiman rilaton kun tio, kio sekvas, oni metos inter komoj. La plej oftaj estas; *do, spite de tio, supozite, tamen, malgraŭ tio, kontraŭe aŭ male, estas dirite, tio estas, krom tio, efektive, cetere aŭ plie, sendube, fine, laste, ekzemple, sekve, en tute, pro tio*, k. c, k. c. Ankaŭ kiam oni interrompas propozicion, intermiksante la esprimojn: *oni diras, kiel oni asertas, kiel oni*

DE LA PUNTUACION DE LOS ESCRITOS

(Continuación)

USO DE LA COMA (,)

I.—Si el complemento oracional se antepone al de idea, éste va separado por una coma: *se recomendó aprendieran bien la clave, a los alumnos.*

II.—Dos complementos oracionales de distinta naturaleza, no formando serie, se separarán con coma: *el profesor dió premios a los discípulos más estudiosos, para estimular a los demás.*

III.—Dos o más miembros de idea, no formando serie, se separarán con coma si pueden convertirse en modificativos de los que preceden: *mañana llegará un esperantista de París,* quiere decir que *el esperantista es natural de París,* pues *de París* es un modificativo de *esperantista* en éste caso; pero si *el esperantista llega de París* será preciso poner la coma después de *esperantista*, para evitar que *de París* se considere modificativo.

IV.—Cuando un miembro trae modificativo, se pondrá coma: al final, si es determinativo y oracional, para expresar que lo que sigue es parte de la oración principal y no de la determinativa; al comienzo y al final, es decir, entre comas, si el modificativo es oracional explicativo, dada la relación remota que existe entre él y la palabra modificada; al comienzo y final, entre comas, los modificativos vocativos y sustitutos. Ejemplos: *La casa donde vivió el Greco, es hoy museo de sus pinturas; el Esperanto, poderoso lazo para unir a los hombres, conseguirá triunfar; callad, ¡alumniadores!, no destrozad la honra de los demás; Zamenhof, el creador de la lengua auxiliar internacional Esperanto, ha sido uno de los más grandes bienhechores de la Humanidad.*

V.—Todas las expresiones conjuntivas o adverbiales que no tienen relación inmediata con lo que sigue, se pondrán entre comas. Las más frecuentes son: *pues, empero, por supuesto, sin embargo, no obstante, por el contrario, es decir, esto es, con todo eso, en efecto, además, sin duda, por fin, por último, por ejemplo, por consiguiente, en suma, por tanto, etc., etc.* También cuando interrumpimos una proposición intercalando


esprimas, oni rakontas, oni murmuras, oni diras, laŭ la teksto..., laŭ la aŭtoro..., k. c., k. c., oni metos ilin inter komoj.

VI.—Ĉiu regata propozicio estos apartigata per komo el la ĉefa kiam tiu sekvas la regantan kaj komenciĝas per konjunkcio kaj havas malproksiman rilaton kun la ĉefa.

VII.—Oni apartigos per komoj la propoziciojn cirkonstancajn, kies rilaton oni starigas per la konjunkciaj adverboj *je tiam kiam, post kiam, post kiam, ĉiam kiam, je la momento kiam.*

VIII.—La infinitivajn, gerundiajn kaj pasivparticipajn modismojn, kiuj havas valoron saman, kian havas cirkonstancaj komplementoj aŭ kondiĉaj kaj kaŭzaj propozicioj, oni apartigos per komo, ekz.: La progreso de nia kara helpa lingvo estos rapida kaj sukcesa, *konsiderante ĝiajn necesecon kaj simplecon*; tiu, kiu travidas iom atenteme ŝlosilon, *vidante la simplecon de Esperanto*, sin decidas al ĝia studo; ne esperu atingi ion, *forlasite la idealo.*

(Daŭrigota)



VIII^a Nacia Kongreso de Esperanto en Oviedo

Aliĝintoj

(Daŭrigo)

- 80.—Bilbao, Esperanta Grupo. Bilbao.
- 81.—S-ro Luis de Otaola Faón. Bilbao.
- 82.—F-ino Felisa de Otaola Faón. Bilbao.
- 83.—Ateneo Popular de Oviedo.
- 84.—Diputación provincial de Oviedo.
- 85.—Banco de Oviedo.
- 86.—Ayuntamiento de Sevilla.
- 87.—Ayuntamiento de Oviedo.
- 88.—S-ro Enrique Urarte Claveria, Militar. Sevilla.


las expresiones *se dice, como se asegura, como se refiere, se cuenta, se murmura, se miente, según el texto..., según el autor..., etc., etc.*, se pondrán entre comas.

VI.—Toda oración subordinada se separará con coma cuando sigue a la principal, empezando por conjunción, y tiene con la oración principal una relación remota.

VII.—Se separarán con coma las oraciones circunstanciales cuya relación se establece por medio de los adverbios conjuntivos *en cuanto que, luego que, después que, siempre que, en el momento que*.

VIII.—Se separarán con coma los modismos de infinitivo, gerundio y participio, equivalentes a complementos circunstanciales o a oraciones condicionales y causales; ejemplo: El progreso de nuestra querida lengua auxiliar será rápido y brillante, *al considerar su necesidad y su sencillez*; el que ojea con alguna atención una clave, *viendo la sencillez del Esperanto*, se decide por su estudio; no esperéis conseguir nada, *abandonando el ideal*.


(Continuará)



- 89.—S-ro Juan del Pozo Candiles, Metalúrgico. Sevilla.
- 90.— » José Llorca Rosado, Metalúrgico. Sevilla.
- 91.— » Miguel Moreno Castillo, Ferroviario. Sevilla.
- 92.— » Enrique Fernández Martínez, Ferroviario. Sevilla.
- 93.— » Antonio González Romero, Empleado. Sevilla.
- 94.— » Francisco Güiter Santacruz, Comerciante. Sevilla.
- 95.— » Cristóbal Rodríguez Pérez, Ebanista. Sevilla.
- 96.—Cámara Oficial de la Propiedad Urbana. Oviedo.
- 97.—S-ro Eugenio de las Heras, Empleado. Oviedo.
- 98.— » Urbano Blasco Escudero, Maestro Nacional. Oviedo.
- 99.— » Severino de la Vega, Ferroviario. Oviedo.
- 100.— » José Orós Jimeno, Oficial de Correos. Zaragoza.
- 101.—Fratego Esperanta Societo. Zaragoza.

- 102.—Banco Herrero. Oviedo.
103.—S-ro Isidoro Díaz Maqueda, Estanquero. Tocina, Sevilla.
104.— * Eusebio Madrid Blanco, Comerciante. Villanueva de las Minas, Sevilla.
105.— * Juan Moros Ojeda, Tornero mecánico. Villanueva de las Minas, Sevilla.
106.— * Antonio Mármol Cordero, Oficinista. Villanueva de las Minas, Sevilla.
107.—Gajeco kaj Laboro, Grupo Esperantista. Tocina, Sevilla.
108.—Centro del Ejército y de la Armada. Madrid.
109.—S-ro Vicente Moreno Casabona. Madrid.
110.— * Eliseo Olego, Ferroviario. Madrid.
111.— * Luis Fernández F. Marcote, Ferroviario. Madrid.
112.— * Isauro Alvarez. Madrid.
113.— * Baldomero González. Madrid,
114.— * Vicente Inglada Ors, Teniente Coronel de E. M. y Miembro de la Academia de Ciencias. Madrid.
115.— * Julio Mangada Rosenörn, Comandante. Madrid.
116.—S-rino Josefa Sanz de Mangada. Madrid.
117.—S-ro Honorato Moncalvillo, Trasona. Avilés, Oviedo.
118.— * Francisco F. Braga, Fabricante. Oviedo.
119.— * Luis Alvarez Ferreros. Oviedo.
120.— * Roberto Marauri. Madrid.
121.— * Delfín Dalmáu. Barcelona.
122.— * Carlos María Cortezo, Médico. Madrid.
123.— * José Perogordo. Madrid.
124.—F-ino María Franco del Canblanco. Madrid.
125.—S-ro Antonio Jiménez García, Estudiante. Oviedo.
126.—F-ino Marichu Jiménez García, Estudiante. Oviedo.

(Daŭrigota)



Vidafo de la Kampo de San Francisco.—Oviedo.

DEL EXTRANJERO

EL CORREO Y EL ESPERANTO

La Dirección de Correos en Berna, para dar a conocer el servicio del correo suizo en los Alpes, ha publicado una bella serie de vistas de las montañas suizas y de las vías alpinas en varias lenguas. Cada serie lleva explicaciones aclaratorias en Esperanto.


En Estonia, el ministro del Tráfico (Dirección de Correos y Telégrafos) decretó el Esperanto, lengua clara, para los telegramas dentro del país y para los dirigidos a Rusia, y en muchas taquillas aparece «Esperanto parolata» (Se habla Esperanto).

El Correo soviético ha editado sellos con texto rusoesperanto, tarjetas-respuesta con texto en ambos idiomas. En Telégrafos está declarado el Esperanto «lengua clara» para telegramas dentro del país y para el Extranjero, según disposición oficial del comisario de Correos y Telégrafos de 17 de junio de 1926.

En Bulgaria, el 19 de marzo de 1926 se declaró por el ministro de Correos y Telégrafos «lengua clara» el Esperanto, y así se comunicó oficialmente a todo el personal, recomendando especialmente a éste el estudio de la lengua, y para facilitar un conocimiento elemental de la lengua dispuso la colocación de carteles con la gramática esperanta en búlgaro, con numerosos ejemplos prácticos, en 500 oficinas del ramo.

EL TURISMO Y EL ESPERANTO

Cada día se extiende más el uso del Esperanto en el turismo: las oficinas de Köln, Budapest y Neuchatel editaron guías ilustradas en esta lengua; lo mismo han hecho Brünn (Checoeslovaquia), Cheltenham-Spa y Torquay (Inglaterra), Dordrecht (Países Bajos) y Dresden (Alemania). En todos estos lugares los Sindicatos de Iniciativas usan el Esperanto para dar a conocer los atractivos que los extranjeros pueden encontrar.



Promenejo de l' Bombe en la Campo de San Francisco. — Oviedo.

VERKARO DE JULIO MANGADA ROSENORN

EL ESPERANTO AL ALCANCE DE TODOS. Premiada con *Mención Honorífica y declarada de utilidad* por el Ministerio del Ejército, según Reales órdenes de 16 de abril de 1912 y 8 de septiembre de 1916 (*Diarios Oficiales* números 88 y 203) respectivamente. Tercera edición, corregida, simplificada y mejorada con gráficos y tablas, con temas y abundante vocabulario. Precio: 1,50 pesetas.

HELPANTA TEMARO POR LERNIGI RAPIDE ESPERANTON. 32 paĝ., $13\frac{1}{2} \times 19$ cm. Tute en Esperanto, laŭ sistemo el demandoj kaj respondoj, enhavas dekok temojn: La saluto; Pri la tempo; La horloĝo; Pri fumado; Korespondado; En kafejo; Ĉeesti teatran prezentadon; Ekskurso al la marbordo; Vespermanĝo en la restoracia vagono; Alveno al marborda urbo; Ili vizitas la urbon; Ili vizitas ŝipon en la haveno; Marekskurso; La familio; La homa korpo; Nutraĵoj; Bestoj; La amikoj de la homo, per kiuj lernanto konatiĝas kun la tuta disvolviĝado de la vivo. La riĉega enhavo, la sistemo, kaj la simpla kaj korekta stilo meritis altvalorajn opiniojn de recenzistoj.

Je la fino aperas «Preĝo sub la verda standardo» de la Majstro, D-ro Zamenhof, Prezo: 0,75 centimojn.

PRI HISPANUJO KAJ GIAJ POPOLKANTOJ. POPOLKANTARO DE MURCIA. 52 paĝ., $13\frac{1}{2} \times 19$ cm. Tute en Esperanto. Tre interesa verko pri formado de la teritorio, pri la indiĝenoj kaj unuaj invadoj kaj pri la nomo HISPANUJO; pri diverseco de la lando kaj tial de la riĉa abundega muzikfolkloro, kaj fine pri la popolkantoj de Murcia kun muzikaĵoj por piano kaj kanto. Rimarkindaj recenzoj estis al ĉi tiu verko, kiu ankaŭ havas bildojn. Prezo: 1 peseton.

FERDINANDO VI^a KAJ FARINELLI. 32 paĝ., $12\frac{1}{2} \times 19$ cm. Tute en Esperanto. Tre interesa romano en prozo kaj verso, laŭ simpla zamenhofa stilo, per kiu leganto konas epizodojn de la vivo de la grandanima reĝo, kiun preskaŭ malsaĝigis melankolio ekspluatata de politikuloj, kaj kiun savas Farinelli per sia muzikarto kaj konsiloj. Ĝi estas kunulino inda je la Aliaj verkoj. Prezo: 0,75 centimojn.

AVILA. 64 paĝ., 12×17 cm. Tute en Esperanto pri historio kaj arto de la urbo; biografioj de la Eklezia Doktorino kaj

tutmondfama mistika verkistino Sankta Tereso, kaj de Alonso de Madrigal (unua duono de la XV^a jarcento), episkopo de la urbo, nomata *Oceano de la Sciencoj*. Ankaŭ ĝi parolas pri tradicio pro martiroj, kaj enhavas 30 belegajn bildojn de la urbo pri ĉeĵaj monumentoj. Prezo: 1 peseton.

EL MODERNA HISPANA PARNASO. 32 paĝ., $13\frac{1}{2} \times 19$ cm. Entenas tradukitajn versaĵojn el famaj modernaj hispanaj poetoj kaj ilustras la libron 20 belegaj bildoj koncernantaj ĉu la poemon, ĉu la landon de la poeto, ĉu la urbon (Sevilla-Granada-Santiago k. c.). Fidela estas la traduko, konservante la formon, silabnombron de la versoj kaj rimon. Prezo: 1 peseton 15 centimojn.

DU JUNAJ FRAŬLINOJ kaj KORNELIINO. 72 paĝ., $13\frac{1}{2} \times 19$ cm. Tiel estas titolataj du noveloj el la modelaj de la tutmondfama aŭtoro de l' KIHOTO, Mikaelo de Cervantes Saavedra, kiujn ni prezentas en esperanta vesto, por kio la tradukinto celis konservi laŭ eblo formon kaj stilon de la verkisto. La unua pritraktas interesegajn aventurojn pro enamiĝintaj junaj nobelulinoj, kiuj decidis serĉi la amaton forkurintan, por kio ili sin decidis sin survesti vire. La dua pritraktas same interesegajn aventurojn en Italujo pro fidela amo de altranga itala nobelulino spite de la kontraŭstaro de ŝia frato. Prezo: 1 peseton 50 centimojn.

DON KIHOTO, Unua kajero, 32 paĝ., $12\frac{1}{2} \times 17\frac{1}{2}$ enhavas Antaŭparolon kun ĉiuj versaĵoj fidele tradukitaj, konservante formon kaj rimon (du poemoj kaj ok sonetoj) kaj la unuan ĉapitron. Estas celo de la tradukinto daŭrigi la tradukon, ĉi tiun liverante per kajeroj. Prezo: 0,60 centimojn.


Ĉiu membro de Hispana Esperanto-Asocio povos aĉeti la tutan kolekton, kiu valoras 8 pesetojn 25 centimojn PO KVIN PESETOJ, antaŭpagante kaj dirante la numeron de sia Membrokarto. Mendante aparte la librojn, Membro de H. E. A. atingos KVARONON da rabato.

Sendu la monon poŝtĝire aŭ per poŝtmarkoj en rekomendita letero.

Por fremduloj la prezoj notitaj estas laŭ valoro de svisa franko, antaŭpagante per poŝta ĝiro internacia aŭ per respondkuponoj de U. E. A. Tutan kolekton oni liveros po SES svisaj frankoj; sed al Grupoj, Asocioj, Librovendistoj, mendantaj al-

menaŭ KVIN kolektojn, oni liveros ilin po DUDEK sv. fr.; mendantoj DUDEK ekzemplerojn el kiu ajn verko faru proponon. Oni sendos la librojn poŝtrekomendite.

Mendanto sin turnu al la verkisto: Glorieta de Bilbao, 5.— Madrid.—Hispanujo.



HISPANA ESPERANTO-ASOCIO gravege progresas kaj plenumas la rolon por la disvastigo de Esperanto en la tuta lando; tial estas devo de Esperantisto aliĝi al ĝi kaj varbi por ĝi novajn adeptojn. La kotizo estas DU pesetoj (unua kotizo 2,50 pro la membrokarto). Sendu la kotizon al la sekretario, S-ro Mariano Mojado, strato Abascal, 13, Madrid. Se vi sendus samtempe TRI pliajn pesetojn por subteni la propagandon per ĉi tiu gazeto vi ricevos akurate kaj ĉiumonate ĝin.

Eksterlandanoj, sendintaj KVIN sv. fr., ricevos la gazeton. Oni akceptas RESPONDKUPONOJN de U. E. A.

Ĉiu sendu la monon poŝtĝire al S-ro Mojado kaj enlandanoj povas pagi per poŝtmarkoj en rekomendita letero.

INTERŜANĜO nur po du specimenoj.

Gazeton, presaĵojn, materialon, k. c., sendu al la Redakcio.